

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Jaume Herp

*ELS DIES 23 I 24 MAIG 1926; GRANS SOLEMNITATS
ESPERANTISTES A SANTA COLOMA DE FARNÈS.
SAMIDEANS ESTRANGERS DE RENOM UNIVERSAL HI
VINDRAN EXPRESSAMENT. ÈS DEURE DE TOTS ELS
DEL NOSTRE TERRITORI, D'APLEGAR-S'HI.*

MÉS PROGRESSOS:

El Duc de Connaught forma part del Comitè del 17è Congrés — el d'aquest any — de l'Associació Britànica Esperantista.

A Rússia són publicats segells i cartes postals, amb les inscripcions oficials en rus, francès i esperanto.

Al 6è Congrés de la medicina tropical per a l'Extrem-Orient, tot just celebrat a Tokio, han estat presentades en esperanto algunes informacions mèdiques per professors de la Facultat. El Butlletí de la Facultat imperial de medicina de Tokio, redactat fins aleshores solament en alemany, conté des d'ara una part en Esperanto. Recordem sobre aquest punt que l'Associació Internacional Esperantista de Metges, que compta amb adherits en 40 països, publica una revista mèdica completament redactada en Esperanto.

Biblioteko Tutmonda

Titoloj de la kajeroj elvenontaj en 1926

- * N^o. 1 Merimée: Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj. El la Franca tradukis Borel.
- N^o. 2 Baudouin: La arto de la memdisciplino (Psikagogio). Originalo.
- * N^o. 3 Karinthy: Humoraĵoj. El la Hungara tradukis Bodo.
- N^o. 4-5 Inglada: La sismologio (tertremoj, vulkanoj). Originalo.
- * N^o. 6-8 Van Eeden: La Malgranda Johano. El la Nederlanda tradukis Bulthuis.
- N^o. 9 Penndorf: El grekaj papirusoj. Originalo.
- * N^o. 10 Bratescu-Voinesti: Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj. El la Rumana tradukis Morariu.
- * N^o. 11-12 La aventuroj de Munchhausen. El la Angla tradukis Applebaum.
- * N^o. 13 Korĉak: Rakontoj humoraj. El la Pola tradukis Weinstein.
- * N^o. 14-15 Puŝkin: Kapitanfilino. El la Rusa tradukis Ŝidlovskaja.
- * N^o. 16-17 Tabory. Cikonikalifo. El la Hungara tradukis Babits.
- N^o. 18 Collinson: La homa lingvo. Originalo.
- N^o. 19 Bujwid: Higiena vivado. Originalo.
- N^o. 20 Bovet: La instinktoj de la infanoj kaj ilia valoro por la edukado. Originalo.
- N^o. 21-22 Kamaryt: Ĥemio en la hejmo. Originalo.
- N^o. 23 Kenn: La penso de Konfucio. Originalo.
- * N^o. 24 Korolenko: La sonĝo de Makaro. El la Rusa tradukis Ŝidlovskaja.

La verketoj signitaj per * estas beletristikaj, la ceteraj estas popular-sciencaj. Ŝanĝoj en la sinsekvo de la verketoj estas rezervitaj.

La gvidantoj de tiu Biblioteko petas la katalunlingvajn aŭtorojn kaj tradukantojn proponi manuskriptojn al «Tutmonda Literaturo» Gvid. Dro. Ernst Kliemke. — Berlin SW 68, Schützenstrasse 24, Germanlando.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Vojstrato Blankerna

En Valldemossa ekzistas vilaĝestro, kiu en la nunaj travivataj tempoj estas ia *avis rara*, ia blanka merlo, aŭ kiel oni diras ĉi tie, ia vera verda ĉevalo. Ekpasis tra lia kapo, kaj li sukcesis ke ĝin aprobus la Komunumo, titoli la stratojn de la monta vilaĝo per aŭtoĥtonaj nomoj, skribitaj tiamaniere kiel konvenas. En bela blanka marmoro, en noblaj romaj literoj, ĉe ĉiu stratangulo pompigas glora nomo: *Nikolao Kalafat'*, la inkunabla presisto kiu en la dezerto de Miramar' ĝemigis la unuan presmaŝinon, samhore kiam pastro Posa, en Barcelono, ĝemigis la sian; *Fratino Ano Mario de la Sanktega Sakramento*, esploristino en la lulja bosko kaj ekspoziciistino de la mistika idilio inter la Amiko kaj la Karulo; *Reĝo Jako II^a*, kiu fondis kaj provizis per kvincent florenoj el oro la kolegion de orientaj lingvoj... Al la larĝa aleo kiun la platanoj ombrigas kaj kiu tra cindrokoloraj olivarboj kaj kverkoj nigriĝantaj longiras serĉi la malfermitan horizonton kaj la sennombran rideton de la ondoj, li almetis la nomon *Vojstrato Blankerna*. Decis ke estus poeto, greftita je vilaĝestro, tiu kiu eltrovus tiun nomon tiel belan kaj tiel ĝustan kaj sukcesus titoli per ĝi vojstraton kaj dekoracii poluritan marmoron. Se nia Ramono Luljo (1) estus ekpensinta trapasigi tiun proteikan personegon sian kiun per la nomo Blankerna li baptis, kaj el kiu li faris la spegulon de la kristana perfekteco en ĉiuspeca el la sociaj klasoj, tio estas jene, de geedziĝo, de religio, de prelato, de apostola sinjoreco, kaj fine, de ermita vivo; se nia Ramono Luljo, mi diras, estus ekpensinta trapasigi Blankerna'n tra tiu civita magistrato de la Komunumo, en la bongusta ĉapitro kiun li estus priverkinta: *Pri tio kion faris Blankerna estante vilaĝestro*, ne mankus iu el la aferoj kiujn efektivigis la vilaĝestro de Valldemossa, Antonio Llorens kaj Clariana.

(1) Vidu biografion en «Kataluna Antologio»

Blankerna estas personego de nubo kaj de sonĝo, riĉa je multe da viroj, kiu efektive meritis stratnomon en tiu vilaĝo kiu lin ekvidis ermito kaj kie, sub la maldelikata kaj granda vestaĵo, li travivis siajn tagojn plej orpentritajn kaj trankvilajn. La vojstrato kiu beligiĝas per tia nomo estas tiu kiu kondukas al Miramar' kaj al la kapelo «antikva» de la Sanktega Triunuo, kaj al la Kaverno de Ramono, kaj al la fonto «kie persono kiu ne amas enamiĝas kiam li trinkas el la fonto», kaj en tiun lokon «inter la vinberkampoj kaj la fenkolejoj» kie Blankerna restadis en ploroj kaj sopiroj. Se, la vinberkampoj jam ne estas tie, tamen ankoraŭ la fenkolo, kiu faras tiun izolejon aroma, kreskas, inter roko kaj roko, kaj malfermas siajn grajnhavajn korimbojn de akra anizo. Ŝajnas ke ankoraŭ estas vivanta la idilio inter la Amiko kaj la Karulo. Ankoraŭ tie kantas la samaj birdoj saltetante de branĉo al branĉo:

«Ekkantis la birdo en la ĝardeno de la Karulo. Venis la Amiko kiu diris al la birdo: Se ni ne interkompreniĝas per lingvaĵo ni interkompreniĝu per amo...»

Ankoraŭ la asketaj vojetoj estas dornaj kaj malperfektaj kiel en la tempo kiam, kiel lilio inter kardoj, ekfloris la enamitula dialogo:

«Pensmalkviete marŝadis la Amiko tra la ĉefvojoj de lia Karulo, kaj li ektuŝegis kaj falis inter dornoj, kiuj estis al li ŝajnaj kvazaŭ ili estus rozoj kaj floroj kaj kvazaŭ ili estus lito de amoj...»

Plenan amason da rapidforiĝantaj rememoroj, pro la granda multego da landoj kaj da urboj kaj da homoj kiujn, kiel dia nova Uliso, estis travidinta Ramono Luljo, li kunportis, al la silenteco de Miramar', ĉirkaŭen de sia medita kapo; sed ili ne sukcesis trovi sian internan pacon kaj sian intiman feliĉegon. Mi trapasis, noktomeze, tra la arbaro de Miramar', noktomeze ĉar estis la horo kiam kuŝleviĝis Blankerna. Ĉio reprenas spektran prestiĝon; kvazaŭ dolĉa tondro alvenas el la profundega maro; zumas la foliaro; kaj en la horo kiam la lampiroj ekbruligas, inter la herbo, la timeman lumetaĵon, ankaŭ havas ĝin brulanta la astroj en ĉeesto de Dio. Kaj la sono de sonorileto kiel marteletoj el kristalo, trafendas tiun silenton kaj rektiras vundi la serafan kaj trembrilantan kunestadon de la steloj. Kaj, kiel abelejo, la ermita kapelo pleniĝas de bruetoj kaj de mielo. Tio estas Blankerna, revivanta, kiu leviĝas eksonorigi ĥorpreĝojn kaj ilin preĝi. Kaj kiam li estas ilin preĝinta, ĉe la fenestro de sia ĉelo, tra la vualo de piaj larmoj, li elrigardas la ĉielon kaj la stelojn; kaj poste reiras dormadi ankoraŭ unu dormon, flugilhavan kaj facilan, kiu ekvekiĝas dum la ektagiĝo...

«Tiamaniere vivadis kaj restadis Blankerna, ermito, konsiderinte ke neniam li sintrovis en tiel plaĉa vivo».

En tiun superbelan izolejon kiun Ramono Luljo saturas per sia ombro, kondukas la ĵusnova *Vojstrato Blankerna*, kiun la platanoj surverŝas per ombra makulaĵo kaj la olivarboj traplenigas per anĝelaj murmuretoj.

Katalune Verkis LLORENÇ RIBER

Tradukis JOSEP VENTURA

Pri Landnomoj

La sistemo de D-ro. Zamenhof

En la ĉi suba esploro mi tute *objektive* klarigos la Zamenhofan sistemon. Ĝin mi ne intencas, ne *volas* diskuti, sed mi rajtas konstati, ke ĝi zorge atentas pri la necesa rilato inter la nomo de la lando kaj tiu de la regnanto, ke tre sufiĉe *logika* ĝi estas kaj ke, kiel skribis, en sia Raporto (paĝ. 8 konkludo), Prof Grosjean Maupin «la fideleco al la ĝenerale akceptita tradicio estas el praktika vidpunkto pli sendanĝera ol ia ajn provo», sed plie, ke ĉia alia sistemo okazigas fatale inter la Esperantistoj kontraŭstaron, proteston kaj diskutojn nepre evitindajn.

MALNOVA MONDO

Eŭropo, Azio kun Egiptujo (1)

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l' sufikso *-ujo* (2).

Gento:	Adjektivo:	Lando:	Gento:	Adjektivo:	Lando:	Gento:	Adjektivo:	Lando:
Angl-o	-a	-ujo	Grek-o	-a	-ujo	Pers-o	-a	-ujo
Bavar-o	»	»	Hind-o	»	»	Pol-o	»	»
Belg-o	»	»	Hispan-o	»	»	Portugal-o	»	»
Brit-o	»	»	Holand-o ⁽⁴⁾	»	»	Prus-o	»	»
Bulgar-o	»	»	Hungar-o	»	»	Ruman-o	»	»
Dan-o	»	»	Hin-o	»	»	Rus-o	»	»
Egipt-o	»	»	Ital-o	»	»	Saks-o	»	»
Fin(n)-o ⁽³⁾	»	»	Japan-o	»	»	Skot-o ⁽³⁾	»	»
Franc-o	»	»	Katalun-o	»	»	Sved-o	»	»
German-o	»	»	Norveg-o	»	»	Svis-o	»	»
						Turk-o	»	»

(1). Por la antikvaj Grekoj kaj Hebreoj *Egiptujo* estis kvazaŭ Azia «Kromlando» Ĝi — sed ne la cetero de Afriko, apenaŭ konita, — apartenas al la Malnova Mondo — same por D-ro Zamenhof, la tradukinto de la Biblio.

(2) Anstataŭ *-ujo* oni ĉiam rajtas uzi *-lando*: *Franclando* (mallongige kaj skribe: *Francel.*) apud *Francujo*, kiel *pomarbo* apud *pomujo*, *preĝdomo* apud *preĝejo*.

(3) Anstataŭ *Fin(n)ujo*, *Skotujo* oni ĝenerale uzas, konforme al la nacia nomo, la formojn: *Fin(n)lando*, *Skotlando* (Vidu Rim. 2).

(4). La vorto *Nederlando* estas nomo, ne de gento sed de lando; sekve la nomo de l' regnanto estas: *Nedertandano*. — Same por *Islando* kaj *Irlando*, se *Ira* gento ne ekzistas.

La sama regulo taŭgas kompreneble por la postmilite restarigitaj sendependaj landoj:

Aŭstr-o	-a	-ujo*	Latv-o	-a	ujo	Slovak-o	-a	-ujo
Ĉeĥ-o	»	»	Litov-o	»	»	Ĉeĥoslovak-o	»	»
Eston-o	»	»	Slav-o	»	»	k. f. p.		

* Fakte, nova ŝtato: ŝtato de la Aŭstroj.

NOVA MONDO

Afriko (!), Ameriko kaj Oceanio.

Ĉar, politike, malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l' sufikso *-ano*.

Lando	Adjekt.	Regnano	Lando	Adjekt.	Regnano	Lando	Adjekt.	Regnano
Alĝeri-o	-a	-ano	Kanad-o	-a	-ano	Peru-o	-a	-ano
Argentin-o	»	»	Kapland-o	»	»	Tunizi-o	»	»
Aŭstrali-o	»	»	Kolombi-o	»	»	Urugvaj-o	»	»
Bolivi-o	»	»	Marok-o	»	»	Uson-o	»	»
Brazil(i)-o	»	»	Meksiki-o(?)	»	»	Venezuel-o	»	»
Ĉil(i)-o(?)	»	»	Nov-Zeland-o	»	»			

NOMOJ DE PROVINCOJ KAJ URBOJ

Aldoni la finaĵon *-o* al la provinca nomo: *Branderburgo, Silezio, Provenco*, — se ne eble, senŝanĝe: *Loiret, Essex*.

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantiĝis: *Parizo, Ĝenevo, Kopenhago*. — Aliaj simple alprenas la finaĵon *-o*: *Londono, Berlino*, — se ne eble, senŝanĝe: *Versailles, Breslau*.

Plej bona gvidanto restas por ni D-ro. Zamenhof.

TH. CART

Prez. de la Lingva Komitato
kaj de ĝia Akademio

(1) Eceptinte *Egiptujon* (vid. Rim. 1).

(2) Ambaŭ formoj: *Brazil-* kaj *Brazili-o* estas pli malpli internaciaj kaj uzitaj. Oni do rajtas elekti inter ili. Persone mi preferus — ĉar pli simplaj — la formojn *Brazilo* (adjektivo: *brazila*; sed, de *Brazilio* la adjektivo estas necese *brazilia*). Pri *Ĉil(i)-o* oni rajtas same argumenti. — Ĉar tiaj detaloj neniel kontraŭas al la Zamenhofs kaj Fundamenta principo, plej bone decidus la enlandanoj mem en interkonsento kun la Akademio.

(3) Formo konsilita de D-ro Zamenhof por diferencigi la landon kaj la ĉefurbon.


Nia Internacia Konferenco en Lokarno 3-6 Apr. 1926

REGULARO DE K. R.

Gravaj organizaĵaj kaj propagandaj aferoj estis en la tagordo de la Konferencoj.

Post la Universala Kongreso en Ĝenevo, aperis bruado de la Franca kaj de la Pola Asocioj por reformoj al la Regularo de la Konstanta Repraesentantaro. La afero estis vere delikata, ĉar, aliflanke tiuj du asocioj plendis ke en la koncernaj kunsidoj dum la Kongreso en Ĝenevo oni ne deĉe atentis iliajn projektojn. Ŝajnis okazonta interna batalo inter la pacaj batalantoj; sed la kontentigo pro la evidenta kaj antaŭeniga laborado de niaj organizaĵaj Institutoj faciligis la konkordon, la akordiĝon. Kaj denove evidentiĝis ke plej ofte malkonkordon naskas la malkompreno: la franca Repraesentanto, kiu ankaŭ repraesentis la polan asocion, kaj la pri tiu afero kontraŭflankaj Repraesentantoj tion deklaris; do anstataŭ akraj interdisputoj okazis amikaj interparoladoj kaj klarigoj, pro kiuj la Regularo de K. R. estas plibonigita per utilaj kaj precizigaj aldonoj el la projekto de la Franca kaj Pola Asocioj.

Repraesentanto de nia Federacio ĉeestis la kunsidojn kaj partoprenis diskute, voĉdone kaj balote la konkludojn. La inteligenta pioniro kaj prezidanto Privat kaj la franca Repraesentanto bone interkonsentis efike helpa-



Kunsido en Lokarno

taj de la agema Ĝenerala Sekretario Robert Kreuz. Kompromisa teksto de la statutoj estis farita, tamen la franca Re prezentanto, kiu ankaŭ partoprenis la diskutojn akordiĝeme, petis voĉdonigon por la teksto prezentita de liaj reprezentataj Asocioj. Nia Re prezentanto tiam demandis: «Kial, do, ni ĉiuj prilaboris la kompromisan tekston?» Sed, tamen, oni voĉdonis, por komplimenti la franc-polan, kaj tri voĉoj estis favoraj; du estis liaj mem, franca kaj pola, kaj la alia, tiu de la Belga Ligo. Ĉiuj ceteraj estis malaprobaj aŭ sindetenaj; la unua sindetena estis tiu de nia Re prezentanto, ĉar li opiniis ke oni ne devis voĉdoni por la franc-pola teksto post ĉies kunlaboro por komuna teksto. Kaj, efektive, post tiu malnepra voĉdono, oni voĉdonis la kompromisan tekston, kaj ĝi estis aprobita *unuanime*. Tio ĉi plene pruvigas ke oni ne devis voĉdoni por la unua. Fine ĉiuj estis kontentaj, akordaj.

ELEKTOJ

Por la nova periodo estas elektitaj en Lokarno la Prezidanto kaj Sekretario de K. R.: unuanime ankaŭ oni elektis la Belgan Ligon por okupado kaj plenumado de tiuj postenoj, kiujn ĝis nun okupis la Brita Asocio, meritanta dankemon por la ekfunkciigo de K. R. Ni havas ĉiujn motivojn por antaŭvido de bona agado de la Belga Ligo por nova kaj vigla funkciigado de K. R.

Por la Centra Komitato ankaŭ okazis elektoj: pro la ekŝigo de la angla S-ro. Page, kaj memrezigno de S-ro. Privat, kiel plej juna Komitatano, por havigo de laŭstatuta elekto de du membroj. Ankaŭ unuanime estas elektitaj S-roj. Privat kaj Stromboli. — Bona elekto! — Kiu diris ke ne estas harmonio en la esperantista movado?

FESTENO KAJ EKSKURSOJ

Tre ĝentila estas la urbestro de Lokarno. Li malavare regalis la esperantistan Delegitaron per ĝojiga festeno en ĉarmega Hotelo Palace, kiu estas vera, tera, ĝardena, viviga paradizo. Fine estis elokventaj tostoj de Lokarnaj aŭtoritatuloj kaj Delegitoj de nia Movado. Ĉiuj konstatas ke la «Spirito de Lokarno», por efektiviĝo, devas esti ne nur noma, dokumenta, diplomata, sed popola, senta, kora. Kaj la ĉefa Movado kun plej efikaj cirkonstancoj por realigo de la spirito de Lokarno, por kiu estas nepre «tu-teŭropa lingvo», nenacia, internacia, neŭtrale homa lingvo, pro sia ekstero kaj sia interno, pro sia korpo kaj sia animo estas ja Esperanto kaj Homaranismo, estas ja la kreaĵo de Zamenhof. Tiu veraĵo estas konstatita en Lokarno, okaze de la Oficiala konferenco de Centra Komitato, Konstanta Re prezentantaro kaj Universala Esperanto-Asocio.

Krom la nomita Festeno, ankaŭ la malavara urbestro de tiu rava svisa urbo, regalis nin per biletoj por ekskursoj, kiuj evidentigis al ni, ke Lokarno, krom la nomo de la paca celita spirito postmilita, estas urbo de montoj belegaj, akvofaloj mirigaj, lago reviga, urba komforto, ripozejo, ĝuejo plej alloga.

DELFI DALMAU



Ĝenera vidaĵo de Santa Coloma

Santa Coloma de Farnés, urbo de nia Kongreso en 1926, Majo 23-25

La urbo Santa Coloma de Farnés kun la najbararo Sant Marçal, la vilaĝo Castanyet kaj la vilaĝeto Sant Pere Cercada, formas komunuman distrikton kiu sidas sudokcidente de Ĝerono sur la riverbordo Tordera; norde estas la distriktoj Osor, Brunyola kaj Vilovi; oriente Riudarenes; sude Riudarenes kaj St. Feliu de Buixallén, kaj, okcidente, Sant Miquel de Cladells kaj Sant Hilari.

Ĝia loĝantaro atingas la nombron 5000: estas 1175 domoj kaj aliaj konstruaĵoj en la distrikto.

Unuaranga banloko, Thermes Orion, je bonegaj kuracakvoj por trinko kaj bano estas sudoriente de nia urbo, propraĵo de nia amiko D-ro Manuel Burch, kies filino Maria, estas ĉarma samideanino.

La urbo Santa Coloma komunikigas kun la provinca ĉefurbo Ĝerono per ĉarvojo 22-kilometra kaj per fervojo, kies stacio estas je naŭ kilometroj malproksime. Regulaj aŭtomobiloj dufoje ĉiutage servas al veturantoj de la urbo al la fervoja stacio kaj revene.

Ĉiulunde okazas ĝenerala distrikta foiro en nia urbo. La kongresanoj vidos ĝin la Pentekostan lundon.

Sur apuda monto, kies pinton okupas ruino de fama kastelo Farnés, estas la sanktejo de la Virgulino de Farnés, kie okazas ĉiujaraj solenaĵoj.



Sonorilejo paroĥa kaj publika horloĝo.

La urba paroĥejo, nomata Sankta Petro estas romana templo. Loka «Sinjoro» Pere Ramon de Vilademay fondis ĝin en 1137 aŭ 39.


Historiaj rimarkaĵoj. — En la XII^a jarcento estas jam nomado de la Kastelo kaj de familio Farners (en dokumentoj) *Farners* (jaro 1111^a), *Farneris* (en 1200), *Farneriis* (en 1245), kaj *Farneriis* (en 1362). La kastelo en 1359, havis 51 pafejojn kaj apartenis al la nobela familio Vilademany

subrilata al vicgrafoj Cabrera. En 1640 oni kontraŭstaris eniron de soldataro de Leonard Moles, kiu trarabis en la lando. Post kelkaj tagoj alvenis la urbon reĝa servisto Monrodó, kies malmodera sinteno elstarigis la popolon kontraŭ li, kie li mortis pro popola bruligo de la konstruaĵo en kiun li rifuĝiĝis. Poste eniris la urbon la soldatoj de Moles kiuj, plej multaj, estis napolitanoj; ili bruligis la urbon kaj detruis pli ol 200 domojn. Tiu fakto ĉefe influis por elstarigo de Katalunujo kontraŭ la registaro de la Reĝo Filipo IV de Kastilujo. Tiu milito estas historie nomata «malkuniga».


La familia domo de Farnés, kies loko estis apud la preĝejo, kaj okupis parton de la nuna *placo de Konstitucio*, estis malaperigata antaŭ 50 jaroj.

En nia urbo naskiĝis fama Beat Dalmau, de la Ordeno de la Predikistoj, kiu mortis 50 jara; en la paroĥa preĝejo estas konservitaj brako kaj dento liaj, kiuj inspiras al multaj religian senton.

Tipika festo estas de Santa Coloma ĉiujare ankoraŭ okazigata, nomata de l' «Pelegrí» de Tossa, kies unuafojo datumiĝas de XIII jarcento.



Fama kastelo Farnés



El la belaj ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

Propono *

Ĉiujare alfluas al la Internaciaj Floraj Ludoj grandega kvanto da esperantistaj literaturaĵoj, kaj el ili konsiderinda nombro estas premiata.

Sed el la premiitaj verkoj aperas nur tre malmultaj, relative, en la esperanta gazetaro, kaj pli malgranda eĉ estas la nombro de la «menciitaj», kiuj estas publikigataj, kvankam inter tiuj ankaŭ ofte troviĝas valoraj kaj bonaj poemoj kaj prozaĵoj.

Opiniante, ke estus por la esp-a literaturo granda avantaĝo kaj por la verkistoj potenca instigilo alia maniero de rapida disvastigado kaj diskonigado.

(1) A La premiitaj verkoj estu ĉiujare okaze de la Floraj Ludoj eldonataj en libro-formo kaj vendataj; la kongreskotizo eble povus jam enhavi la prezon.

(1) B Se tio ne estas ebla, oni interrilatu kun «Literatura Mondo» ke

* La koncernatoj memoru ankaŭ la konsideraĵon pri la F. L., aperintan en nia gazeto, paĝo 281 (januaro).

Kongreso de K. E. F. 1926 Santa Coloma de Farnés

PROGRAMO

UNUA TAGO (23 MAJO)

- Je la 10^a kaj duono: oficialakcepto de la kongresanoj.
- Je la 11^a: Malfermo de la kongreso kaj disdono de la kongreslibro ĉe la urbdomo.
- Je la 14^a kaj duono: solenaj Floraj Ludoj ĉe la Círculo Columbense.
- Je la 18^a: ekskurso al la Banĵo Termes Orion.
- Je la 20^a Oficiala Festeno en la Hotelo Termes Orion.
- Je la 22^a Serenado antaŭ la urbdomo.
- Je la 23^a Ĥora arta kunveno ĉe la societo Artística Farnense kie estos kantata la Espero.

DUA TAGO (24 MAJO)

- Je la 8^a, solena meso kun esperanta prediko de D-ro. Johano Font, Profesoro de EL COLLELL ĉe la preĝejo St. Sebastia.
- Je la 10^a laborkunsido kaj formaligo de Kataluna Esp. Instituto (por eldonoj kaj Floraj Ludoj), ĉe la Urbdomo.
- Je la 12^a, vizito al la foiraj placoj.
- Je la 16^a, vizito al la Kulturdomo, Biblioteko kaj Parko, kaj ekzamenoj de la kandidatoj al kapableco aŭ profesoreco pri Esperanto.
- Je la 18^a ferma kunsiko ĉe la urbdomo.
- Je la 23^a Sardanoj kaj aliaj dancoj honore de la kongresanoj.

TRIA TAGO (25 MAJO)

- Je la 8^a, Deiro de la ekskursanoj al Montseny, vizite al St. Hilari Sacalm, ĝiaj fontoj kaj banejoj.
- Je la 8^a kaj kvarono. Deiro de la ekskursanoj al kastelo Farnés kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.
- Je la 9^a kaj duono, meso ĉe la Sanktejo de Nia Virgulino de Farnés.
- Je la 10^a Vizito al la arta sanktejo de la Infano Jesuo de Praga.
- Je la 10^a promenado tra la «Turó del Vent» kaj kastelo Farnés.
- Je la 13^a. Kampartagmanĝo en la arbaro de Farnés ĉe la mirinda Font Vella de Sant Hilari Sacalm.
- Je la 15^a Vizito al la fonto kaj banejoj.
- Je la 18^a. Vizitoj al la tieaj fontoj.
- Je la 19^a. Afabla adiaŭo al la kongresanoj.

VAGONAROJ al Santa Coloma-Sils, eliras el Barcelona matene je la 5^a 40 kaj je la 7^a 45. (Estació de França).

*Kataluna Esperantisto Maj 1926 N° 23 Tria
Epo*

Kongresaj Sciigoj

Vojaĝo. — Estas petate, ke ĉiuj kongresanoj forveturontaj de Barcelona uzu la vagonaron de la . Oni rememoru, ke en Sils oni devas deiri la vagonaron por atingi la kongresurbon pere de aŭtomobiloj, kiuj atendas la kongresanojn.

Grupaj Standardoj. — Kiel kutime oni rekomendas, ke la grupaj standardoj ne manku ĉe la Kongreso. Espereble ĉiu grupo portos la sian por plireliefigi la alvenon de la kongresanoj kaj la ĉarmon de la festoj.

Salutado de delegitoj. — Ĉe la Malferma Kunsido, post la parolado de la prezidanto, la delegitoj povos alparoli la kongresanojn. Por tio estas necese, ke la delegitoj prezentu sian rajtigilon al la sekretario.

Membrokarto. — Kun tiu ĉi numero ni sendas al ĉiu membro lian membrokarton por 1926. Al la grupoj ni ankaŭ sendas la respondan nombron da kartoj laŭ la nombro da membroj por kiuj ili pagis en 1926. Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, faru tion tuj por ĝustatempe ricevi la kartojn. Oni rememoru ke por voĉdoni estas necese prezenti la membrokarton.

Kongreslibro. — Al ĉiuj kongresanoj, membroj de K. E. F. aŭ aliĝintoj, oni donacos la Kongreslibron, kiel oni anoncas en la programo.

Labora Kunsido. — Laŭ la jena tagordo ĝi okazos: sekretaria raporto, aprobo de bilanco, diskuto de la prezentitaj proponoj, elekto de komitatanoj, elekto de kongresurbo por 1927 kaj eventualaj petoj kaj proponoj.

Ekzamenoj. — Bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ la samideanoj, kiuj deziras sin prezenti al la ekzamenoj. Por tio oni turnu sin al la O. K. de la XIII Kongreso de K. E. F., Sta. Coloma de Farnés. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de *kapableco* kaj *profesoreco*.

Oficiala Festeno. — Nepre necese estas sendi tuj la enskribiĝon al la O. K., se vi deziras partopreni la Festenon. La koston oni devos pagi ĉe la Akceptejo.

Ekskursoj. — Por bli bona organizo de la ekskursoj kaj kun la deziro ke ĉio funkciu sen plendoj nek bedaŭroj, ĉe la alveno al Sta. Coloma bonvolu sciigi la O. K. pri la ekskurso, kiun vi deziras partopreni.

ĝi post la F. L. dediĉu specialan numeron pliampleksan, almenaŭ, al la ĉefverkojpremiitaj.

(2) La «menciitaj» verkoj estu presitaj pli ofte ol nun en K. E. kaj L. M., tiel ke post la jarfino la tuta provizo estu elĉerpita.

(3) La plej bonaj versaĵoj kaj prozaĵoj de la ĝisnunaj F. L. estu kolektataj en bele bindita libro por disvendado.

(4) La ĉiujara publikigaĵo de la F. L. povus enhavi ankaŭ la raporton pri la festo kaj la fotografiaĵojn.


JOSEF BERGER




Enirejo de Thermes Oïton.

Pro... kaj Por...

Antaŭ kelkaj monatoj ni aludis la laboron de la sekretario de Komitato en Santa Coloma, kiu organizas nian Kongreson 1926. Hodiaŭ ni devas honore nomi niajn malnovajn samideanojn Josep Canaleta kaj P. Costa, kiuj, en la prezido de nia loka Komitato la unua, kaj kiel urbestro la alia, plej efike ambaŭ laboras por sukcesiĝi nian nunjaran Kongreson en tiu ĉarma urbo. — Koran dankon al ĉiuj, kiuj, en la lastaj momentoj devos ankoraŭ pliigi sian agadon kaj oferon por heroa elteno en la organizo kaj finpretigo.



Biblioteko kaj kulturdomo.



Fasado de Thermes Orion.

XII^{aj} Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta Amon: Premio al la verko n-ro. 31, devizo: **Amo Miraklojn Okazigas**. Unua mencio: n-ro. 1, devizo: «Vivanta strofo»; Dua mencio: n-ro. 3, devizo: «I auelles gracies en son rostre...»; Tria mencio: n-ro. 39, devizo: «Cyrano»; Kvara mencio: n-ro. 2, devizo: «Un sonnet sans defaut vaut seul un long poeme...»; Kvina mencio: n-ro. 4, devizo: «Manta gens me mal razona...»; Sesa mencio: n-ro. 136, devizo: «Qu'ieu am la plus de bon aire...».
- II. — Originala «Ama» verko en prozo: Premio: n-ro. 45, devizo: **Ereto**; Unua mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo» kun titolo «En la mondon...»; Dua mencio: n-ro. 76, devizo: «Papilia Ludo»; Tria mencio: n-ro. 82, devizo: «Seniĝi estas ĝui»; Kvara mencio: n-ro. 115, devizo: «Ĉu amo devigas...?»; Kvina mencio: n-ro. 9, devizo: «Paco Amo kaj Esperanto».

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la kataluna versaĵo: «Les Noces de l'Alosa i El Llessami»: Premio: al neniu. Unua mencio: n-ro. 8, devizo: «Zamenhof»; Dua mencio: n-ro. 62, devizo: «Kompreno estas vojduono».
- II. — Traduko de la kataluna prozaĵo «Caminar amb la Lluna»: Premio: n-ro. 117, devizo: **The Moon**; Mencio: n-ro. 123, devizo: «Lunhela nokto».
La Natura Floro estas aljuĝita al la verko n^o 31, devizo: «Amo miraklojn okazigas»

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de la Komitato de K. E. F.: n-ro. 67, devizo: **Ne faru Frazojn pri la Vivo, sed Penu Ekkoni Ĝin**; Unua mencio: n-ro. 138, devizo: «La verko de l' Majstro»; Dua mencio: n-ro. 66, devizo: «Per Esperanto al Dio»; Tria mencio: n-ro. 11, devizo:

- «Kion oni volas tion oni povas»; Kvara mencio: n-ro. 101, devizo: »Kabe».
- II. — Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»; n-ro. 140, devizo: **Unueco Donas Forton**; Mencio: n-ro. 129, devizo; «Nomina sunt odiosa».
- III. — Premio de S-ro. Narciso Bofill: n-ro. 5, devizo: «**Sonetoj kaj Madrigaloj**»; Unua mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo» titolita: «La nubeto»; Dua mencio: n-ro. 59, devizo: «Laboru senĉese, ne zorgu pri fin! la tomo atendas ne verkon, sed vin»; Tria mencio: n-ro 119, devizo: «Dies irae dies illa...».
- IV. — Premio de S-ro. Miquel Argemí: Dividita en du partojn.
Unua Parto: Premio: n-ro. 14, devizo: **Pax Tibi, Marce, Evangelista Meus**; Unua mencio: n-ro. 92, devizo: «Belaĵo estas ĝojo por ĉiuj»; Dua mencio: n-ro. 41, devizo: «Blankaj birdetoj»; Tria mencio: n-ro. 63, devizo: «Mi faris mian aferon kaj atendos ceteron»; Kvara mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo», titolita: «Dimanĉe»; Kvina mencio: n-ro. 34, devizo. «Ni proponas, vi disponas»; Sesa mencio: n-ro. 132, devizo: «Sub la sankta signo».²
Dua Parto: Premio: n-ro. 33, devizo: **Mi diris, Penu, Hom', kaj Firme Fidu!**; Unua mencio: n-ro. 48, devizo: «Serĉante ni lernos»; Dua mencio. n-ro. 106, devizo: «Miraklo».
- V. — Premio de Universala Esperanto - Asocio: Al neniu. Laŭ iniciato de la donacinto, ĝi restas ne aljuĝita, ĉar neniu el la verkoj prezentitaj montras kvalitojn por meriti ĝin.
- VI. — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»: n-ro. 38, devizo: **Procedo et Semper - Italia - Semper!**
- VII. — Premio de D-ro. Sekretulo: Trionigita inter la verkoj, n-ro. 50, devizo: **La Vivo ne estas Plej Valora Posedaĵo...**, n-ro. 93, devizo: **Tradukoj estas kiel Virinoj kaj** n-ro. 98, devizo: **La Sinjorino kun la Skarlata Masko**. Mencio: n-ro. 40, devizo: «Mitologio».
- VIII. — Premio de Registara Urbestaro de Sta. Coloma de Farnés: N-ro. 80, devizo: «**Aglo blanka**» Mencio: n-ro 113, devizo: «Homo devas pensi ne nur pri siaj rajtoj, sed ankaŭ pri siaj devoj».
- IX. — Premio de S-ro. Ramón Masgrau: n-ro. 29, devizo: «**Modesta batalanto por rajto kaj honoro**»; Unua mencio: n-ro. 22, devizo: «Amu vian patrujon»; Dua mencio: n-ro. 130, devizo: «El floroj la abel', alportas ion al la ĉel'».
- X. — Premio de S-ro. Paroĥestro de Sta. Coloma de Farnés: n-ro. 36, devizo: **Honny soit qui mal y pense**; Mencio: n-ro. 128, devizo: «Dofoto».
- XI. — Premio de ĵurnalo «La Veu de la Selva»: n-ro. 61, devizo: **Zuiderzee**.

- XII. — Premio de la firmo «Grafikaj Artoj»: n-ro. 108, devizo: **Rapidu**.
- XIII. — Premio de «Granda Hotelo»: n-ro. 72, devizo: **Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas**.
- XIV. — Premio de «Centra Hotelo»: n-ro. 69, devizo: **Kaj tamen... nia fina celo estas ja - La Morto**. Unua mencio: n-ro. 77, devizo: «Virino kiu neniam perfidos»; Dua mencio: n-ro. 131, devizo: «Popoloj devas fariĝi al centro celantaj eroj...».
- XV. — Premio de Pastro Josep Puig: Ne konkursita.
- XVI. — Premio de Banloko «Orión»: Ne konkursita.
- XVII. — Premio de D-ro. Manuel Burch: n-ro. 94, devizo: **Por la XX^a**; Mencio: n-ro. 86, devizo: «Ĉiam antaŭe kaj antaŭen».
- XVIII. — Premio de S-ro. Josep M.^a Iglesias: n-ro. 58, devizo: **Amb la llum del teu mirar has omplert la meva vida**.
- XIX. — Premio de «Ĥora Societo»: Ne konkursita. Konsente kun la donacinto, oni aljuĝas la premion al la verko n-ro. 114, devizo: **Ĉu la muziko efektive malkaŝas nian animon?**
- XX. — Premio de S-ro. Josep Callis.
- XXI. — Premio de S-ro. Josep Corominas.
Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
XX. — al n-ro. 70, devizo: «**Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas**».
XXI. — al n-ro. 71, devizo: «**Plej granda potenco kuŝas en la komenco**».
Unua mencio: n-ro. 83, devizo: «Polvo kaj ombro ni estas»;
Dua mencio: n-ro. 46, devizo: «Tagiĝas en la mondo».
- XXII. — Premio de Ekscelenca S-ro. Joan Ventosa i Calvell. Duonigita inter la verkoj, n-ro. 107, devizo: «**Historio**» kaj n-ro. 103, devizo: «**Laboremo**». Mencio: n-ro. 104, devizo: «**Kredo**».
- XXIII. — Premio de la grupo «Paco kaj Amo»: n-ro. 44, devizo: «**Kiu amas sian kunhomon amas Dion**». Unua mencio: n-ro. 96, devizo: «Multaj idiomoj: milito! unu lingvo: paco!»; Dua mencio: n-ro. 57, devizo: «Por la bono ne ekzistas nacia limo».
- XXIV. — Premio de la grupo «Ĝerona Espero»: n-ro. 78, devizo: «**Radio per Esperanto**». Mencio: n-ro. 110, devizo: «Per flugiloj de subtila etero...»
- XXV. — Premio de S-ro. Ivan H. Krestanoff.
- XXVI. — Premio de S-ro. Narcís Massagué.
- XXVII. — Premio de la grupo «Lumon».
Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
XXV. kaj XXVI. al n-ro. 24, devizo: «**Mieux vaut tard que jamais**».
XXVII. al n-ro. 105, devizo: «**Ruzo**».
Mencio al n-ro. 51, devizo: «Vian mizeron fabeligu»

- XXVIII. — Premio de «Aĝrikultura Sindikato»: n-ro. 23, devizo: «**Tragedio**»; Unua mencio: n-ro. 18, devizo: «Merlin»; Dua mencio: n-ro. 97, devizo: «Hanibalo kaj Scipiono»; Tria mencio: n-ro. 6, devizo: «Amiko fidela, trezoro plej bela»; Kvara mencio: n-ro. 47, devizo: «Mi riskis ĝin»; Kvina mencio: n-ro. 111, devizo: «En la mondon venis nova sento».
- XXIX. — Premio de D-ro. Ramon Torres i Carreres: n-ro. 124, devizo: «**Atakema**». Mencio: n-ro. 95, devizo: Ĉiam antaŭen — Zaaz».
- XXX. — Premio de D-ro. Sennomulo: n-ro. 17, devizo: «**Vojaĝanto**»; unua mencio: n-ro. 99, devizo: «En la infero de l' milito»; dua mencio: n-ro. 74, devizo: «La okuloj perfidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi»; tria mencio: n-ro. 88, devizo: «Glis»; kvara mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo», titolita: «Adigaj proverboj».
- XXXI. — Premio de S-ro. Esteve Rossell: n-ro. 79, devizo: «**Memorare novissima tua...**»
- XXXII. — Premio de S-ro. Joaquim Trias.
- XXXIII. — Premio de S-ro. Francesc Trias.
- Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
- XXXII. — al n-ro. 109, devizo: «**Tales of the Crusaders**».
- XXXIII. — al n-ro. 120, devizo: «**Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots els que hi són**».
- Unua mencio al n-ro. 100, devizo: «En la sankta nokto»; Dua mencio: n-ro. 133, devizo: «Vintra suno»; Tria mencio: n-ro. 89, devizo: «Kio estas la plej dolĉa? La Dormo».
- XXXIV. — Premio de S-ro. Esteve Monegal: n-ro. 37, devizo: «**Lingvo estas fosilia historio**»; Unua mencio: n-ro. 81, devizo: «Kiu deziras efikon, tiu uzu rimedon»; Dua mencio: n-ro. 28, devizo: «Modesta konsilanto»; Tria mencio: n-ro. 102, devizo: «Babilado»; Kvara mencio: n-ro. 122, devizo: «La bonuloj estas ĉiam la gajuloj krom pro malbonŝanco»; Kvina mencio: n-ro. 65, devizo: «Malŝagulo».

Laŭ la dua regulo de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj aŭ menciitaj fariĝas propraĵo de la institucio, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «KATALUNA ESPERANTISTO» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Eventuale oni petu al la Redakcio de «KATALUNA ESPERANTISTO» permeson por reprodukto.

Majo 1926. — D-ro. Edmond Privat, *Prezidanto*; Joseph Berger; Josep Rosselló; Josep Gener, Artur Domènech; Josep Ventura, *Sekretario*.

Sciĝo. Oni informas nin ke la laŭreato per la Naturo Floro estas la talenta kaj batalema pioniro S-ro. Teodoro Jung el Horrem bei Köln (Germanujo) al kiu ni sendas de ĉi tie nian plej sinceran gratulon pro lia venko. Li bonvolis elekti kiel Reĝinon de la Festo la ĉarman kaj distingindan fraŭlinon *Mercè Burch de Barraquer*, filino de D-ro. Manuel Burch, posedanto de Banloko «Orion» en nia kongresurbo. Ni prezentas ankaŭ al ŝi, tiomotive, nian fervoran gratulon kaj la esprimon de niaj respektoplenaj salutoj kaj komplimentoj.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

§ 14. La regulformeco estas sekvo de la ekonomia principo. Estas pli facile sin orienti en urbo kun rektaj stratoj paralelaj aŭ radiecaj, ol en kurbostrata urbo. Estas pli facile lerni kaj uzi nian nombraron ol la francan aŭ la rusan. La reguleco en formoj plaĉas ankaŭ al la estetika instinkto, kiel plaĉas simetrio kaj ritmo, en desegno kaj sonatoj.

Zamenhof celis atingi simetrian regulecon en sistemo da rilataj vortoj ekz. anstataŭ hindeŭropa serio da pronomoj: eĝ (me) tu (te) i (iti) noŭs (mes) vus (tes) oni (onti) svo (se) li starigis pli simetrian: *mi ci li ni vi ili si*.

Anstataŭ *ci* ni atendus *ŝi*, sed lasta formo estis necesa por alia serio: tio, tia, tie,...

Por kompletigi la pronomojn Fauvart-Bastoul proponis aldoni *iŝi* apud *ŝi*.

En la unua lernolibro 1887 ekzistis: *kian, tian, ian,...* kun senco: kiutempe, tiutempe,... la unuaj adeptoj tuj rimarkis neoportunecon de tiu serio, kies formoj koincidis kun akuzativo de *kia, tia, ia,...* Tial Zamenhof proponis ilin ŝanĝi je la nunaj *kiam, tiam, iam*, ĝi estis unua ŝanĝo en la primitiva Esperanto.

Inter ceteraj neregulaĵoj, facile korekteblaj, ni povas konsideri radikon *ĉi*, kiu havas duoblan uzon: en la serio *ĉio, ĉia, ĉiu,...* kaj en la serio *ĉi tio, ĉi tia, ĉi tiu,...* Plej simple estus ĝin lasi en la unua serio, alpreninte por la dua: *ce* tio, *ce* tia, *ce* tiu,.... Tiu proponata *ce* estas neokupita elemento, sufiĉe internacia: franca *ce*, latina *ecce, hicc*, ukraina *ce*, irea *ce*, eola *ke*, slavnova *se*, kartvela *ese*. Eĉ estus racie starigi la duan serion jene: *ceo, cea, cee, ceu,...* rezervinte simplan *ce* por rilatuzo: *ce libro, ce homo,...* Alia neregulaĵo estas en duobla uzo de *kiu*, kiel nomo de persono kaj kiel rilata pronomo:

Kiu iris? Iris homo.

Homo, kiu iris, estas pala.

Kio falis? Falis pomo.

Pomo, kiu falis, estas ruĝa.

En estonta Esperanto kredible oni uzos *kiu* nur por persono, alpreninte por la dua rolo pli simplan *ki*:

Kiu iris? Iris homo,

Homo, kiu iris,...

Kio falis? Falis pomo.

Pomo, ki falis,...

Fine, ni ne havas kompleta la serion: alio, alia, alie,... Tial, por diri «alio» oni ŝanceliĝas inter *alia*, *aliulo*, *alia homo*, kc. Sed same kiel *tia*, *kia* ne povas signifi: tiu, kiu, ankaŭ la alia ne povas signifi: aliu. Pri multaj neregulaĵoj nin atentigis s-ro Wüster en siaj prilingvaj artikoloj, ekz. pri uzo de prepoziciaj konjunkcioj.

En nomoj de bestoj ekzistas alispeca nereguleco; laŭ la fundamento ni havas:

vira ulo	ina ulo	neŭtra ulo
?	hundino	hundo
?	bovino	bovo 1
bovo 2	bovino	?
kapro	kaprino	?
ŝafo 3	ŝafino	?
?	ŝafino	ŝafo 4
koko	kokino	?
kato 5	katino	?
?	katino	kato 6
?	ĉevalino	ĉevalo 7
ĉevalo 8	ĉevalino	?
?	anserino	ansero
?	anasino	anaso

1. laŭ la franca, angla, germana traduko.
2. laŭ la germana, rusa, pola.
3. lau la franca, rusa.
4. laŭ la franca, angla, germana.
5. laŭ la rusa, pola.
6. laŭ la franca, angla, germana.
7. laŭ la franca, angla, germana.
8. laŭ la rusa, pola.

En uzado de pronomoj ankaŭ ne ekzistas reguleco. Pri tiu uzado ni povas konsulti opinion de Zamenhof en liaj «Lingvaj Respondoj»: «La pronomoj *li* kaj *ŝi* estas uzataj nur por personoj. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi *li ŝi*. (1892). «Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi nur *ĝi*... eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto.» (1908). «Parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj... ni uzas la vorton *ĝi*. Tiel same ni parolas ankaŭ pri *persono*.» (1893). «Kiam ni parolas pri homo (kaj infano) ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon *ĝi*. Sed ĉar la vorto «*ĝi*» enhavas en si ion malaltigan kaj por la ideo de *homo* ĝi estus iom malagrabla, tial mi konsilas al vi uzi por *homo* la pronomon *li*.» (1907). Post Zamenhof ni nenion novan tiurilate akiris, kaj la uzado de tiuj pronomoj ĉiam estas lasita al libera bonvolo de ĉiuj lingvuzantoj.

§ 15 Ekzistado de sinonimoj (samsignifaj vortoj) ankaŭ kontraŭas la principon de unusigneco. Oni distingas du specojn da sinonimoj: proksimumaj kaj perfektaj. La proksimumaj sinonimoj prezentas tre similajn, sed ne tute identajn, signifon, ekz. instrui kaj lernigi, eta kaj malgranda, kolonelo kaj regimentestro, mondo kaj universo. La perfektaj sinonimoj prezentas unu saman signifon, ekz. evolucio = evoluo, idiomio = dialekto, kirŝo = ĉerizbrando, vermuto = absintaĵo, likva = fluida, deismo = diismo, letono = latvo, kroato = korvato, hungaro = maĝaro, malgrandruso = akraĵono, ktp. Studo de naciaj lingvoj montras, ke en unu matura lingvo, en unu ĝia momento, ne povas ekzisti en komuna uzado du samsignifaj vortoj. La perfektaj sinonimoj do povas ekzisti nur dise, en malsamaj tempoj aŭ en diversaj lokoj. La vortaroj, kiuj entenas diversfontan materialon, prezentas ofte grandan kvanton da perfektaj sinonimoj.

En nuna, provizora kaj prepara, periodo de Esperanto ekzistas tolerataj multaj sciencaj kaj teknikaj radikoj, kies perfektaj sinonimoj estas la kunmetaĵoj. Poste, kiam nia lingvo definitive akceptiĝos, ni ne plu bezonos la sciencodevenajn vortojn, kaj ili nature iom post iom malaperos el la komuna uzado, simile je la helpa trabaro kiu servas dum la konstruo de domo, kaj kiun oni forigas, kiam la domo estas finkonstruita.

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

Pro... kaj Por...

La verkaĵo «Pri Amo», subskribita de Ed. Wiessenfeld, aperinta en nia marta numero, estas originala de la fama hinda poeto R. Tagore.

Jaume Pruna. Jen nomo de kunfederaciano modestega, kiu tamen bone servas al nia celo. Plej malgranda ekstera organiza ŝanĝo aŭ novaĵo kiun li ekscias estas de li tuj komunikata al ni por evitigi erarojn de nia Federacio aŭ por informado al nia gazeto. Li, kiu ne akceptas noman honoron aparteni al nia Komitato, bonvolu hodiaŭ akcepti publikan esprimon de nia dankemo kaj simpatio.

Helpu progresigi Esperanton ĉe blinduloj, sendante ĉiuspecajn naciajn kaj internaciajn blindulaĵojn, precizajn informojn kaj statistikojn pri la blindula stato en via lando, por Tutmonda Porblindula Ekspozicio (aprilo-majo 1926 en NewYork kaj en aliaj gravaj urboj de Usono), adresante ĉion al Prof. J. Benšahar, President, World Union of Associations for the Blind, Inc., 455 W. 42nd Street, NewYork City, Usono.

Via Devo - Grava — Se vi aŭdas senpere aŭ per viaj lokaj radio-stacioj la staciojn de Anglujo, ni petas vian helpon subteni petskribon, kiun ni sendas al la Brita Brodkasta Kompanio, por instigi ilin fari brodkastojn en aŭ pri Esperanto. Skribu leteron al tiu Kompanio, esprimante viajn dezirojn tiurilate, kaj montrante kiom utile estus, ke la anglaj radiosendaĵoj tiel trovu pli vastan komprenataron. Kelkaj minutoj sufiĉas, sed la servo estos granda. Adresu al 5XX, ĉe Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London, W. C. L., Anglujo.

«Esp. Klubo Palma», la vigla centro de nia insulara movado, organizas ekzamenojn por la lernantoj, en Palma de Mallorca. Nia konata pioniro N. Boñill, granda paca batalanto kaj lerta profesoro de nia lingvo internacia, kaj la komitatoj de la Klubo S-ro. Rosselló kaj Pastro Font konsistigas la tribunalon. Estas certe granda sukceso por la profesoro kaj lernantoj. Ni antaŭe gratulas ilin, kaj ĝoje memoras ke niaj balearaj samideanoj organizas de antaŭ kelkaj monatoj karavanon por ĉeesto al nia Kongreso en Santa Coloma.

«Nova Sento», la plej riĉa grupo esperantista en nia lando, vigle malvolviĝas en proletara kvartalo de Barcelona, kie ĝi organizas instruajn paroladojn, kursojn de Esperanto k. a. — En la programo de ĝiaj proksimaj okazigotaĵoj estas kurso sub gvidado de nia amiko A. Domènech, kaj karavano al Santa Coloma por ĉeesto al nia Kongreso.

Nia malnova ĉiam vigla Societo «Paco kaj Amo» publikas bulteneton. Laŭ la aprila numero ties samideanoj organizas karavanon al Santa Coloma de Farnés, okaze de nia Kongreso. — La malnova ano de «Paco kaj Amo» kaj kara samideano Masachs revenis al Barcelona kaj ricevis multajn simpatiesprimojn. Bonvolu la nian sinceran ankaŭ akcepti.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

18-a Universala Kongreso de Esperanto

kaj

Internacia Somera Universitato

EDINBURGO — 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926 — EDINBURGO

Adreso por leteroj. — Sekretarioj, 18-a Kongreso de Esperanto, EDINBURGO, Skotlando.

Aliĝiloj. — Nericevintoj bonvolu peti aliĝilon rekte de la sekretarioj.

Kotizo. — 20 ŝilingoj Britaj = proksimume 20 Ger. Rmk., 25 Svis. fr., Nederl. guld., 5 Uson. dol. Oportuna maniero sendi la kotizon, estas per Brita ŝtatbileto por L1 ("currency note, one pound"), havebla ĉe bankoj en multaj urboj, kaj sendota per registrita (rekomendita) letero; aŭ per ĉeko por L1 : 0 : 3.

Garantia Kapitalo. — Jam garantiita L266.

Donacoj ricevitaj. — Por ordinara Kaso L39.

Por Blindula Kaso L13 (Kaso por ebligi blindulojn partopreni la Kongreson). Por Speciala Celo L60: de du malavaraĵ samideanoj, sub la ĉifra devizo, "Smizropga tivüüt hahome un ĉosopjuh".

La unua solvonto de tiu ĉifro ricevos de la donacintoj senpagan kongreskarton.

Somera Universitato (Senpage por ĉiuj Kongresanoj). — Al la listo de paroladoj donita antaŭe oni aldonu sub "Folkloro kaj Popolaj kantoj": — *Katalunaj*: S-ro Jaime Grau Casas; kaj *Hispanaj*: S-ro Julio Mangada Rosenorn. S-ro. Andreo Ĉe prelegos pri "La rekta metodo en la instruado de Esperanto. Por kursgvidantoj" anstataŭ pri la temo anoncita antaŭe.

Fakaj Kunvenoj. — Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn. Ĝis nun malmultaj anoncis.

Oratora Konkurso. — Konkursontoj bonvolu avizi pri siaj intencoj partopreni.

Tramveturoj. — La L.K.K. sukcesis fari finanĉan arangon, laŭ kiu ĉiu Kongresano povos uzi senpage dum la Kongresa periodo, ĉiujn Edinburgajn tramveturilojn, kaj urbajn omnibusojn.

Mendiloj por Loĝado, k.t.p. — Nericevintoj bonvolu peti mendilon rekte de la sekretarioj.

Kongresa Fotografiĝo. — Okazos mardon, 3 Aŭgusto.

Kongresaranĝoj. — Aldone al informo citita antaŭe, la L.K.K. nun plezure anoncas, ke la internacie konata fortepianisto, S-ro Jean Baptiste Toner, ludos solaĵojn ĉe dimanĉa koncerto.

Akcepto ĉe Britaj Havenoj. — Kongresanoj irontaj al iu el la jenaj havenoj, anoncu al la respektive nomataj samideanoj, sufiĉe longe antaŭtempe, la dato de alveno, por ricevi dum la trapaso ian helpon bezonatan.

LONDON London Congress Committee, c/o British Esperanto Association, 17 Hart Street, London, W.C.1.

DOVER S-ro W. Chitty, 51 Park Avenue, Dover.

FOLKESTONE S-ro J. S. Clough, 62 Guildhall Street, Folkestone.

GLASGOW F ino Yuille, 32 Minerva Street, Glasgow, C. 3.

GRIMSBY S-ro W. M. C. Nowell, 194 Farebrother Street, Grimsby.

HULL S-ro A. E. Hepton, 89a Grafton Street, Hull. S-ro F. W. Coulson, ĉe ŝipkompanio, "Wilson Line", Hull.

LIVERPOOL S-ro J. D. Applebaum, 11 Mayville Road Mossley Hill, Liverpool.

NEWCASTLE S-ro A. R. Fairbairn, 21 St Mary's Terrace, Ryton-on-Tyne.

SOUTHAMPTON S-ro R. N. Bruton, 14 Suffolk Avenue, Southampton.

La dek devoj de la Esperantisto laŭ U. E. A.

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu: vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.
6. Verkante en Esperanto, ne kredu interesa, kion nacilingve ne niu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. *Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.*

La Kataluna Esperantista Federacio estas la ĉefa organizo de nia movado, en la katalunlingva teritorio kaj la unika kiu subtenas la centran Komitaton kaj la Konstantan Rezentantaron, oficialajn internaciajn Instituciojn de la Esperantistaro. — Via aliĝo al nia Federacio estas plej efika.